

BRONISLAW PILSUDSKI.

Nasko, gravedeco kaj aborto ĉe la loĝantoj de la insulo Saĥalin.

(Daŭrigo).

Nur post kiam al la novnaskito la umbiliko cikatriĝis, la patro povas denove komenci sian laboron kaj ĉasadon, aŭ forveturi el la domo. Sed oni ne solenas la naskiĝon per ia hejma festo aŭ manĝado, nek en tiu tempo, nek pli poste.

La naskintino dum tiu sama tempo devas resti en la kabano kaj apenaŭ dum plej fortaj frostoj ŝi povas reveni pli frue en la jurton kaj nur, se ŝi mem estas la mastrino en ĝi, car alie nenia virino ŝin akceptus. La malfeliĉajn akcidentojn, kiuj trafas malfortigitajn naskintinojn, restintajn solece en la kabano, ili alskribas al malbonaj spiritoj. Por ne allasi la lastajn al interno de la mizera kabano, en kiu okazas unu el plej gravaj kaj misteraj aktoj de la naturo, ili metas antaŭ la enirejo hakilon, fortimigontan ĉiajn fantomojn. Sed nature tiu simpla kaj vulgara rimedo ne ĉiam helpas. Mi memoras, kiel foje alkuris al mi mia amiko, Gilako Kan kun peto pri helpo por lia novnaskita fileto, al kiu la malsana edzino senintence vundis la kapon, devigata mem al si tranĉi kaj kudri, sidante en la malvasta abomena būdo. Alian fojon ekbrulis la naskejo de la fajro, kiun la naskintino ekbruligis por varmigi siajn rigidigantajn membrojn. Kaj se tiaj malfeliĉaj akcidentoj ne okazas multe pli ofte, oni devas danki nur al mirinde forta karaktero kaj harditeco de la virinoj, kiuj eĉ elĉerpitaj kaj malsanaj ne perdas la konscion kaj laborkapablon. La nova kaj en tiu momento de ilia vivo forte ekscitita patrino sento streĉas iliajn fortojn kaj volon al tiu grado, kiun nek konas nek komprenas la viroj.

Senedzaj Gilakinoj provokas iafoje pro honto al si artajn abortojn. Ili uzas tiam tiujn rimedojn, al kiuj ili alskribas ankaŭ la naturajn nevolitajn abortojn. Sed kredeble malsperteco en la abortigo estas la kaŭzo, ke oni ofte aŭdas ankaŭ pri infanmortigoj.

Naskoj de malvivaj infanoj okazas ĉe Gilakinoj, sed tiel malofte, ke mi en la lastaj dekkelkaj jaroj ne aŭdis eĉ pri unu tia kazo.

Gilakoj estas tre sindetenemaj en inter-

paroloj pri seksaj rilatoj kaj aperoj. Tial ankaŭ ili klarigas al malgrandaj infanoj la aperon de nova familiano en tia maniero, ke ili evitu ĉian pluan ĝenantan preparolon. Se infano naskiĝis somere, ili diras, ke la novnaskito estis elfosita el sub la radikoj de arbo; en la vintro ĝi estis trovita sub la neĝo, forŝovelita ĉe konstruo de la kabano.

Tiu sama moderemo ne lasas la virinojn uzi por menstruo la ordinaran vorton „ĉoh“ (sango), sed en interparoloj kun konatulinaj aŭ kun la edzo la virino diras pri monataĵo „antaĥ pŝind“ t. e. la gasto venis.

Ajnoj.

En tute aliaj kondiĉoj okazas la nasko ĉe aliaj loĝantoj de Saĥalino, nome la harriĉaj Ajnoj, memorigantaj per ilia eksterajo pri grandrusaj vilaĝanoj. Ĉe ili ni renkontas kompletan maleston de maloportunaĵoj, malhelpantaj la naskantaron kaj oni ne povas ĝin alskribi al la pli proksimaj kaj daŭraj interrilatoj de Ajnoj kun la kultura popolo de Japanoj, ĉar la interrilatoj kun ili ne ŝanĝis tute la aliajn maldelikatajn morojn, kiujn Ajnoj same konservis, kiel Gilakoj, starantaj malproksime de la influoj de Japanujo kaj Manĝurio. La kaŭzon de pli granda zorgemeco por la naskantino ni devas serĉi en la multe pli bona sociala situacio de la virinoj ĉe Ajnoj enkomune. La virino neniam estas vendata, per la edziniĝo ŝi ne transiras al fremda gento. La parencecon post la patrino ili ŝatas pli, ol la parencecon post la patro. Ĝenerale oni trovas en la ajna familio klarajn postsignojn de patrinestrado (matriarĥio), kvankam jam tre estingita, sed aperanta ankoraŭ en tia grado, ke en multaj rilatoj la sorto de la ajna virino estas multe pli facila, ol ĉe la najbaraj gentoj.

Ĉar la knabino post la edziniĝo ne rapidas kun la translokiĝo en la edzan domon, sed plej ofte restas la unuajn kelkajn jarojn en la gepatra domo, tial la unua nasko okazas ordinare ĉe ŝiaj plej proksimaj parencoj. Unu mia konatolino, virino en mezaj jaroj,

veturis jam por kvara nasko en sian vilaĝeton, al sia familio.

Jam el tio oni povas konkludi, ke Ajnoj liveras al la naskantino pli da oportuneco, ol iliaj najbaroj, Gilakoj kaj Orokoj. Kaj efektive la konduton de ĉiuj ĉirkaŭantaj karakterizas simpatio kaj estimo por la suferanta kaj baldaŭ patriniĝonta. Jam dum la gravedeco la virino ĝuas pli da zorgemo kaj atento. Mi ofte rimarkis, kiel ili indulgas la gravedan, helpas ŝin en laboro, toleras ŝian ripozemon pli longan dormon k. t. p.

Por la nasko la virino ne bezonas forlasi la domon, sed restas sur sia ĝisnuna loko ĉe la fajrujo. Kontraŭe ili forsendas el la jurto por la daŭro de la nasko ĉiujn infanojn, gejunulojn kaj iafoje eĉ plenaĝajn virojn. Unue ili opinias, ke la observado de aliaj personoj povas pliigi la naskajn dolorojn kaj due ili scias, ke estas por la naskanta virino dezirinda kiel eble plej granda trankvilo. Por ne malpurigi la plankon, ili sursternas la lokon sub la malsanulino per abiaj aŭ pinaj branĉetoj; krom tio ili submetas ankaŭ malnovan maton, plektitan el herbaĵo kaj malnovan vestaĵon. La naskantino kuŝiĝas sur dekstra aŭ maldekstra flanko, vestita per malnova vestaĵo kaj facile ĉirkaŭligita per zono el ia ajn ŝtofo, krom el la fadenoj de urtiko; dum la malvarma jartempo ŝi estas vestita ankaŭ per botoj, kiujn ŝi tamen demetas en printempo kaj somero.

Ĉe la eliro de la infano la naskanta, kuŝante sur flanko, disŝovas la femurojn kaj se ŝi mem ne povas levi la femuron, tiam ili metas inter la genuoj grandan kunvolvaĵon el malnova vestaĵo. Ĉe la naskanta sidas ĉiam iu sperta virino, ne forlasanta ŝin de la unua komenco de l'naskaj doloroj. Kutime faras tiun helpon aŭ la propra patrino, aŭ onklino, aŭ alia amanta, proksima parenco. Ofte mi observadis, ke al la naskantino en la edza domo alveturis ŝia parenco, kvankam estis proksime aliaj spertaj virinoj, sed malpli parencaj, aŭ eble malpli favoraj.

Por akceli la naskon kaj plifaciligi la dolorojn, la akuŝantino uzas masaĝon. Tremante pecon da mola, glitiga kreskaĵo, nomata mara brasiko (laminario) kaj varmiginte ĝin, por eligi iom da muko, ŝi masaĝas per tia glitaĵo en komenco forte la ŝultrojn kaj poste pli malforte la bruston kaj ventron de supre malsupren. Ili uzas al tio ankaŭ simpatian kuracilon: envolvinte en mola rabotaĵo sekigitan vesperton, ili frotas per ĉi tiu rabotaĵo la ventron. Se tamen malgraŭ ĉio la nasko prokrastas, ili elŝiras el sub hundina ventro kelkajn harojn, ĉirkaŭvolvas ilin per salika rabotaĵo kaj per ĝi de nove masaĝas.

La virino, funkcianta kiel akuŝistino, turnas sin per petoj kaj preĝoj al la spiritoj de la mortintaj avinoj, kiuj enkomune estas konsiderataj solaj protektantinoj de la virino. La peto ordinare sonas jene: „kie ajn vi estas, ho vi miaj avinetoj, en la hodiaŭa tago volu helpi al ĉi tiu suferanta virino!“

Akuŝistino povas fariĝi nur virino prudenta, kuraĝa, kiu povas moderigi siajn kompatojn kaj sentojn kaj ne perdas la konscion ĉe la ĝemoj kaj krioj de la naskanta. La akuŝistino devas scipovi ne nur fizike helpi kont aŭ la suferoj de la malsanulino, sed ankaŭ ŝin konvene konsoli kaj trankviligi. Al unuenaskantino la akuŝistino persvadas, ke ŝi pacience toleru la dolorojn kaj rakontas pri aliaj paciencaj virinoj, kiuj naskis jam kelkajn infanojn kaj kiujn envias la seninfanaj.

Ĉe la naskoj partoprenas iom ankaŭ la edzo kaj ĝenerale la viroj de la domo. Se la virino ĝemas, la viroj starigas en angulo de la fajrujo malgrandan, rabotitan bastoneton (speciala oferaĵo al dioj, kiun Ajnoj nomas „inaŭ“) kiel oferon en tiaj kazoj al la diino de l'fajro, ĉar el inter la dioj ŝi ĉiam havas la plej proksimajn rilatojn kun homoj kaj povas ilin ĉiam, se ŝi nur volas, helpi. La viroj ankaŭ ĉirkaŭligas la malsanulinon sub la brusto per ŝnureto, tordita el longaj salikaj rabotaĵeroj, kiun ili nomas „cinoje inau“ t. e. tordita inau kaj kiun ili ofte uzadas kiel kuracilon ĉe ĉiaj fortaj doloroj. Se malgraŭ ĉio la nasko prokrastiĝas, tiam plej aĝa viro de l'domo faras novan oferon al la diino de l'fajro. Estas starigata malgranda „inaŭ“ meze sur la fajrujo inter brulantaj ŝtipoj kaj dum ĝi malrapide forbrulas, la maljunulo, sidante sur malgranda mato antaŭ la fajro, murmuretas improvizitan por la okazo preĝon. Se ĉe tio la brulanta bastoneto falos en direkto de la preĝanto, ili konsideras tion kiel bonan signon, montrantan, ke la preĝo estas akceptita kaj ke la doloroj de la naskanta baldaŭ ĉesos.

La naskaj doloroj ĉe Ajninoj komencas frue kaj daŭras tre longe. Malfacila ili nomas nur tian naskon, kiu okazas la kvinan tagon post komenco de la unuaj naskaj doloroj. Alprenante la infanon, la akuŝistino diras: „asiri ĉjacia inankarahti“ t. e. nova maljunulo, estu sana! Se naskiĝis knabino ŝi diras anstataŭ „ĉjacia“ „paŭko“ t. e. maljunulino. Ajnoj nome kredas, ke la infanojn alsendas el la dua mondo la mortintaj parencoj, vivantaj sub la tera supraĵo. Tial ankaŭ kiam la patrino tuj post la distranĉo de la umbiliko rapidas preni la infanon en siajn brakojn kaj la infano kvazaŭ atendas en tiu ĉi momento,

la patrino diras: „A! Ajno! vok erambotara-nahci ne nanko“, kio signifas: Rigardu, o homoj, kiel ili maltrankviligas pro ĝi, t. e. tiuj, kiuj sendis la infanon en ĉi tiun mondon, rememoras ĝin en ĉi tiu momento kaj maltrankviligas, ĉu ĝi estas sana kaj feliĉe finis la vojaĝon.

Antaŭ infanoj Ajnoj nenion kaŝas kaj la infanoj bone scias, kiamaniere la nasko okazas; ne ekzistas ankaŭ ia bezono. primensogi ilin pri la apero de nova frateto aŭ fratineto.

La edzo de la naskanta povas anstataŭi la akuŝistinon, se ŝi ne venis ĝustatempe, aŭ se la nasko komencis neatendite.

En la tago de la nasko la edzo ordinare ne laboras, sed ne pro iu superstiĉa kutimo, sed pro kompato kaj maltrankvilo. Tre interesas lin ankaŭ, kiun la praaĵoj sendis al li, filon, ĉu filineton kaj li tuj demandas pri tio la akuŝistinon, kiu lakone respondas: „ohkajo“ (viro) aŭ „mahneku“ (virino). Mi povas tamen rimarki, ke la sekso de la novnaskito estas al Ajnoj indiferenta kaj kvankam mi iafaje aŭdis, ke la patro dezirus filon, tamen neniam okazis, ke mi estus aŭdinta pri ia malkontento aŭ kolero pro la nasko de knabino ĉu flanke de la gepatroj, ĉu flanke de la parencoj. Se la edzo de la naskinta devas

prizorgi ian neprokrasteblan urgantan aferon, li povas jam la sekvantan tagon forlasi la edzinon kun la novnaskita infano, se ilia farto estas bona kaj minacas neniu danĝero.

Sed la unua tago estas gaja por patrino kaj patro kaj li devas partopreni en la festeno, aranĝata pro la nasko. Antaŭ ĉio ili ĵetas en fajron tranĉitan sovaĝan ajlon (Alium victorale). Ajnoj opinias, ke dioj amas ĉi tiun kreskaĵon kaj ĵetante ĝin en la fajron, ili pretendas devigi diojn partopreni en la festeno. Ili kuiras ankaŭ rizon kun la sama ajlo — malofta, bongusta manĝaĵo — kaj al la regalo per ĝi ili invitas ĉiujn najbarojn, kiuj kunvenas kaj silente, zorgante pri trankvilo, necesa por la malsanulino, manĝas la preparitan manĝaĵon, kuniĝante kun la gemastroj en gajeco.

Ankaŭ al la malsanulino ili donas kiel eble plej bonan kaj nutran manĝaĵon, nome rizon kaj sekigitan fiŝon, rostitan en foka graso. Sed oni ne donas al ŝi berojn, enhavantajn sukron kaj ĝenerale ion ajn malfacile digesteblan. Mi vidis ekzemple, ke unu naskintino rifuzis nian panon, kiun ŝi antaŭe ofte volonte manĝadis. Malpermesitaj estas al la naskintino manĝaĵoj tre malvarmaj kaj ĉio por ŝi estas varmigata.

(*Daurigo sekvos.*)

Esperantigis Regino Fels.

D-RO JAN STELLA-SAWICKI.

Sekreto kuracista.

— Mi ne scias, sinjoro kuracisto, de kie mi akiris ĉi tiun ekzantemon sur tuta korpo — diris al mi juna virino, de kiu mi ricevis matene leteron kun peto ŝin viziti.

Mi esploris la malsanulinon tre zorgeme kaj trovinte, ke ĉiuj glandoj estas ekokupitaj kaj la ekzantemo havas la formon, tute difinitan en medicina scienco, mi atentigis la klientinon, ke ŝia malsano estas tre danĝera.

— Vi estas infektita — mi diris — kaj vi devas vin submeti al tre energia kaj zorgplena kuracado.

La juna virino terure paliĝis kaj preskaŭ svenis pro timo tiel, ke mi estis devigita ŝin subteni, por ke ŝi ne falu. Poste ŝi kovris la vizaĝon per la manoj, falis antaŭ mi sur genuojn kaj kaptinte mian manon, komencis ĝin kisi, vokante per malĝojega voĉo.

— Savu min, sinjoro kuracisto, ĉar mi estis peka edzino kaj kredeble Dio mem sen-

dis al mi tiun ĉi malsanon. La edzo forveturis antaŭ tri monatoj eksterlanden, mi restis sola... mi eraris... kaj nun revenos la edzo baldaŭ — kion mi faros malfeliĉa, kion mi faros? Li forpelos min, li pereigos min en opinio de la tuta mondo, li neniam ĝin al mi pardonos! Savu, savu min, sinjoro, tutan vivon mi estos al Vi danka.

Mi suprenlevis la plorantan pekulinon, dirante, ke ĉion mi faros, kio de mi dependos, por kovri ŝian eraron kaj sanigi ŝin de la grava malsano. De tiu tago mi komencis ŝin kuraci kun granda zorgemo, nenion preterlasante, kio povus la malsanon mallongigi — sed malfeliĉe tiu ĉi malsano apartenas al tiuj, kies daŭro estas tre longa.

La malsanulino plenumadis miajn ordinojn kun plej granda akurateco kaj obeemo, esperante, ke la resaniĝo efektiviĝos antaŭ reveno de la edzo. Sed la esperoj malsukcesis!

Foje, kiam mi venis por matena vizito, la pacientino, nenion dirante, donis al mi por tralego depeŝon, ricevitan de la edzo, sciigantan pri tio, ke la edzo alvenas je la 9-a vespere el eksterlando. Resaniĝo nature ne estis ebla, ĉar la kuracado daŭris apenaŭ du semajnojn.

— Kion fari? sinjoro kuracisto! kion fari? — demandadis la kompatindulino kun mal-espero.

— Mi revenos ĉi tien antaŭ la 9-a — mi respondis post ioma pripenso — kaj vi restu en la lito. Kiam la edzo alveturos, mi diros al li, ke vi estas grave malsana kaj ke via sanstato bezonas multan delikatecon kaj atentecon. Ni penos plilongigi tiun ĉi staton kiel eble plej longe, por forigi ĉiujn suspektojn kaj gajni tempon por kuracado.

— Sinjoro — petegis ŝi — ne forlasu min, subtenu min per konsilo kaj helpo, mi estos danka al vi la tutan vivon.

Je la 9-a vespere mi estis ĉe la malsanulino, kiam revenis la edzo. Intersalutoj de la geedzoj estis tre koraj, sed ŝi estis neordinare pala kaj incitita tiel, ke ŝi ĉiumomente esploris kaj li plendis pri tro granda lacigo pro la vojaĝo. Por fini tiun ĉi scenon, malagrablegan por mia pacientino, sub preteksto de necesa ripozo mi konsilis al la edzo, ke li sin kuŝigu kaj ripozu post laciga vojaĝo.

— Sinjoro kuracisto — diris al mi la alveninto — faru la komplezon veni al mi, ĉar mi volus sciigi ion pri la malsano de mia edzino kaj peti konsilon, kiel mi devas procedi.

La malsanulino sendis al mi petegan rigardon.

— Estu trankvila — mi direktis mallaŭte, salutante ŝin adiaŭe — miklopodos ĝin aranĝi plej bone.

Kiam ni eniris kabineton de la edzo, li donis al mi cigaron kaj ekkomencis demandi pri malsano de l'edzino. Konforme al la plano, kiun mi antaŭe elpensis, mi respondis, ke ĝi estas interna grava malsano, bezonanta grandan zorgemecon kaj geedzan delikatecon, kaj mi esprimis la esĉeron, ke li estos maltrudema kaj permesos fini la kuracadon, kiu laŭ ŝajno daŭros ĉirkaŭ ses semajnojn. Mi esperas, ke mi post tiu tempo la edzinon tuter resanigos.

Tiu sciigo naskis neniun proteston de la edza flanko, kontraŭe mi rimarktis sur lia vizaĝo rideton kvazaŭ de kontento. Kun mirego mi aŭskultis liajn konfidenciojn:

— Sinjoro kuracisto, mi havas al vi grandan peton. De tempo de la forvojaĝo el la domo trafis min granda malfeliĉo; mi infektiĝis. Mi kuracigis min tre zorge, ulcero malaperis, sed

restis sur la korpo ekzantemo, estu do tiel favora esplori ĝin kaj konsili, kion mi devas fari?

Mi esploris la sinjoron de la piedoj ĝis la kapo kaj mi vidas, ke lia sanstato neniom diferencas de la sanstato de lia edzino. Kaj li daŭrigis siajn petojn:

— Kion fari, sinjoro kuracisto, por eviti la suspekton ĉe l'edzino? Ŝi estas tiel amema kaj tiel nervema, ke, kiam ŝi nur antaŭsentus, ke mi estis nefidela, mi havus mian vivon venenita. Savu, sinjoro kuracisto, kaj mi estos al vi danka la tutan vivon.

— Bone, mia sinjoro — mi diris — mi petas nur tre zorge plenumadi miajn ordinarcojn kaj mi klopodos konvinki vian edzinon, ke la kondiĉoj de ŝia sanstato bezonigas kelkmonatan ripozon, por ke la organismo plifortiĝu kaj povu kiel antaŭe funkcii

— Ĉion mi plenumados kiel eble plej zorge, sinjoro kuracisto — certigadis la edzo — bonvolu nur tre singardeme tuŝadi tiun ĉi aferon, ĉar mi tre timas, ke ŝi ne rimarku, ke mi min kuracas.

Konfidu min — sinjoro — mi respondis. Por forigi ĉiujn suspektojn, mi kuracos vin per injektadoj hidrargaj, kiuj estas malpli agrablaj, ol ordinaraj enŝmiradoj, sed kaŭzos neniun suspekton.

De tiu tago mi fariĝis konfidulo de l'edzo kaj de l'edzino. Ambaŭ kun plej granda atento kaj dankemo obeis miajn konsilojn. Ĉiutage venadis la edzo al la edzino, por ŝin karesi kore kaj rekompenci almenaŭ iom pro manko de aliaj pruvoj de geedza sindonemo. Ĉiu el ili en sekreto kontraŭ la alia konfesadis al mi sian timon, ke la geedza abstinenco ne estu rompita antaŭtempe. Kaj mi trankviligadis ilin, ĉar mi certe sciis, ke neniu el ili rompos mian ordonon. timante konigi la sekreton kaj kaŭzi per tio ĉiujn terurajn sekvojn. Tiel trapasis ses semajnoj, ĝis kiam malaperis ĉiuj sekundariaj aperoj de l'malsano. Ne ekzistis vortoj de adoro, per kiuj ne regalus min la geedzoj, surŝutante min preskaŭ ĉiutage per komplezaĵoj. Ĉi tiu unu kazo donis al mi pli ol mil florenojn da enspezo kaj koran amikecon de tiuj homoj. Antaŭ nelonge ili mortis unu post alia, sincere sin amante kaj estimante kaj mi havis la plezuron, ke preskaŭ ĉiufoje, kiam mi renkontiĝis duope kun li aŭ kun ŝi, ili rememorigadis al mi la servon, kiun mi faris al ili en tiel malagrablaj cirkonstancoj de l'vivo. Iliaj infanoj rigardas min ĝis nun, kiel la plej bonan amikon de iliaj gepatroj kaj pagas al mi pro tio per konfido kaj estimo.

Tradukis St. Lazica.